Fajfilon mi devas fini pli frue ol Binče. Hodiaŭ mi jam fajfos. (Li serĉas en la poŝoj.) Kie mi havas mian tranĉileton? Hm, kien mi ĝin nur metis! Ja mi ĝin ne perdis! Vidu, unu tranĉileto! (Li prenas la tranĉileton, kiu estas sur la unua benko). Kiel bela ĝi estas! Per ĝi mi tranĉus fajfilojn. Ho, kiel bonege ĝi tranĉas! Se ĝi estus mia! Kies ĝi estas? Neniu! Tiel akra estas ĝi! Pli bona estas ĝi ol mia tranĉileto! Kiel mi skrapus kaj akriĝus per ĝi! (Li rigardas ĉirkaŭen.) Neniu! Neniu vidas min!... Sed mi ne rajtas! Kies ĝi estas? Neniu! Mi ja

- trovis ĝin. (Li metas ĝin denove en la poŝon.) Sed se iu vidas min. Mi perdis ankaŭ mian tranĉileton kaj certe iu trovis ĝin. Tiun ĉi mi trovis, mi vere trovis ĝin! (Li enmetis ĝin en la poŝon). Sed, se ili trovos ĝin ĉe mi? (Li eltiris ĝin el la poŝo kaj volas remeti ĝin sur la benkon.) Kiel bela tranĉileto! Mi faros ankaŭ al nia plorema Anjo unu fajfilon ... Vere, mi kaŝos ĝin! (Li rigardas ĉirkaŭen kaj finfine li kaŝas la tranĉileton sub la balaajujon.) Tiel! (Li enmetas la manojn en la poŝojn.) Se iu venas nun! Plej bone estas preni la aktujon kaj reveni poste. – Ej, mia tranĉileto! (Li forkuras.) Dum momento estas silento. Ekaŭdiĝas rido kaj kurado.
- Neŝika: Fi, fi, trifoj vi estis venkita, vi ĉasas, vi postrestis, ha, ha!
- Binĉe: (alkuris de malantaŭe) Mi kaptus vin, se mi ne faletus sur la ŝtuparo, ke vi sciu!
- Neŝika: Ha, kompreneble, prave! Kial vi estis tiel ridinda? (Ŝi skrapas al li la karoteton.) Vidu, mi ne falis. Fi, venkita! Vi postrestis, ha, ha!
- Binĉe: Certe ... Venontfoje mi jam montros al vi! Vi babilemulino babilema!
- Neŝika: Prefere rigardu vin! Kial vi lastfoje diris al Nace, ke li nur parolas, ke li estas malkuraĝulo, ĉar li timis anonci sin, ha?
- Binĉe: Mi diris, bone! Certe vi rakontis veron! Nu, sed kial vi ne diris al li en la vizaĝon? Jes, vi ja timis, ke li riksu vin!
- Neŝika: Fige, mi ne timas lin, nu kion li povas fari al mi? Ha, ha, vi fuĝis lastfoje antaŭ li. Ni ĉiuj ridis.
- Binĉe: Sciu, vi estas kapreto!
- Neŝika: Do, kio estas vi?... Nur unu longa lango vi estas!
- Binĉe: (Kolere rigardas, serĉas ion en la saketo.) Vi, vi... Vi, Neŝika, aŭskultu! Ĉu vi havas hejman taskon?
- Neŝika: Certe!
- Binĉe: Donu, montru ĝin al mi!... Sciu, mi ne povis....
- Neŝika: Aha, jam denove vi ne havas kalkulitajn rezultojn de la hejma tasko! Bele, bele! Faru rapide ĝin! Estas ankoraŭ iom da tempo.
- Binĉe: Jes, sciu, Neŝika, mi ne povis...Montru, nu!
- Neŝika: O, jes, jes, ĉu nun mi ne estas kapreto, ha?
- Binĉe: Forgesu tion, montru al mi la taskon!
- Neŝika: Tiel do, vian maldiligentecon mi devas subteni, ĉu? Ĉu mi ankoraŭ estas babilemulino?
- Binĉe: Ne, ne, vi ne estas plu! Vi ne estas kapreto, vi ne estas bablemulino, vi estas diligenta knabineto.- Nun mi petas la taskon!
- Neŝika: Bone, tio estas lastfoje! Nur promesu al mi, ke vi estonte ĉiam estos laborinta la taskojn mem!
- Binĉe: Sed tion mi ne povas, mi ja volus, sed mi ne povas, ĉar mi devas labori hejme. - Nun donu al mi la kajeron!
- Anica: (timeme enpaŝas) Saluton! (Ŝi serĉas la tranĉileton.)
- Neŝika: Kion vi serĉas?
- Anica: (balbute) Tranĉileton! Hieraŭ mi forgesis ie ĉi tie la tranĉileton, nun ĝi malaperis.
- Neŝika: Sed kie? Ĉu vi scias sendube, ke vi forgesis ĝin ĉi tie?
- Anica: Jes, mi scias! Mi ordigadis miajn aĵojn en la saketo, kaj mi lasis la tranĉileton sur la benko ĉi tie. (Ili ambaŭ serĉas).
- Neŝika: Ĝi estas nenie!
- Anica ploras: Mia tranĉileto! La onklo donis ĝin al mi por la naskiĝtago, sed ĝi nun malaperis.
- Binĉe: Vi jam perdis ĝin, ne ploru plu nun!
- Neŝika: Silentu nur kaj faru la taskon! (Al Anica): Kie vi lasis ĝin?
- Anica: Ĉi tie, ĉi tie... Mi bone scias, ke ĉi tie. (Ŝi montras sur la benkon.)
- Neŝika: Ĉu vi ne perdis ĝin survoje?
- Anica: Nee!
- Neŝika: Sed ankoraŭ demandu la purigistinon Micka kaj la kamaradon lernejestron!
- Binĉe: Iru demandi kaj ne ploru plu!
- Neŝika: Ne parolu tiel akre! Kiel vi ululus, se vi perdus vian tranĉileton! (Al Anica): Mi iros kun vi. (Ili eliras).
- Mariĉka: Bonan matenon! Ĉu vi estas sola?
- Binĉe: (Rapide kaŝas la kajeron.) Vi ja vidas!
- Mariĉka: Tiel mi estas kolera, la patrino ne preparis al mi rapide la matenmanĝon kaj mi tuj forkuris en la lernejon.... Kion vi laboras?... Ej, ni ludos hodiaŭ kun la kvina klaso "Inter du fajroj". Vi estos kiel rezervo! Tiel ni batfaligos ilin! –
- Binĉe: Se nur Drago ne ludus! Li pafas terure!
- Mariĉka: Ni devas atenti, ke ni trafos lin antaŭe. - Ĉu vi laboras la taskon? - Momenton, ke mi vidas se ni havas la samajn. -
- Binĉe: Nun lasu min! Vi vidas ja, ke mi ankoraŭ ne finis. (Li denove kaŝas la kajeron de Neŝika.)
- Mariĉka: Vi estas tedulo! - Sed, kion vi kaŝas, ha?
- Jurĉek: Saluton! Nu, vi estas hodiaŭ fruaj? - Ĉu vi laboras la hejman teskon? - Bonege! - Ankaŭ mi skribos nun. - Binĉe, ĉu vi jam havas la fajfilon? Vidu, kia estas mia! Iom ĝi jam fajfas! –
- Binĉe: Montru! - Ankaŭ mia fajfilo estos baldaŭ preta. Ĝis morgaŭ mi faros ĝin! –
- Mariĉka: (Dumtempe manĝas la panon kaj iras al la balaajujon.)
- Jurĉek: Ĉu ne estos belega? - Ankoraŭ unu mi ektranĉos, ankoraŭ pli bonan. - Vi vidos, ĝi estos longa kaj mi faros en ĝin tri truojn. (Li rigardas la balaajujon.)

- Binče: Mian fajfilon mi bone pripentros, ke ĝi estos bela! - Vi vidis, duone mi jam faras ĝin. –
- Jurček: (Timeme rigardas, kiam Marička ĵetas la paperon en la korbon.) Jes, kio, kion vi diris? Jes, pli bela..., ne, ne, pli bona ĝi ne estos! (Ekfajfas.) Vidu, kiel ĝi jam nun fajfas! –
- Nežika (kun Anica): La purigistino ne prenis ĝin. Serĉu ankoraŭfoje! La kamaradino instruistino venos baldaŭ en la klason. – Ne ploru, nu!...
- Marička: Sed kio okazis? - Kion vi serĉas, kion vi serĉas ĉi tie, Anica?
- Nežika: Ŝi parolas, ke ŝi hieraŭ forgesis la tranĉileton ĉi tie. Nun ŝi ne povas trovi ĝin, -
- Marička: La tranĉileton? Ĉu ĝi estis bela? - Kie vi lasis ĝin? Nu, ne ploru, ĝi ja ne povas malaperi. Oni jam trovos ĝin. – Kia estis ĝi? –
- Jurček: (Malkviete subaŭskultas.) Binče, montru al mi la hejman taskon!
- Binče: Mi ankoraŭ ne havas ĝin preta ...!
- Anica: La onklo donis ĝin al mi por la naskiĝtago. - Neniam mi ankoraŭ havis tranĉileton. - Tiel belaaa tranĉileto ĝi eestiis!
- Nežika: Ne ploru, ni ja serĉos ĝin. –
- Marička: Pro la tranĉileto plori ne indas. - Vidu, mi perdis iam novan, belan ganton, sed mi ne ploris, ankaŭ tiam ne, kiam le patrino batis min. - Nu, vi ja povas ricevi novan tranĉileton. – Ni serĉos ĝin kaj ni trovos ĝin....! Aŭskultu! Povas esti, ke iu intence kaŝis ĝin.....
- Nežika: Kien oni povas kaŝi ĝin? - Sub la benkoj ĝi ne estas, malantaŭ la tabulo ankaŭ ne. - Ĉu ĝi estas en la korbo?... Ankaŭ ĉi tie ĝi ne estas. –
- Jurček: (malkviete, rapide) Neži, ĉu vi jam havas la taskon?
- Nežika: Jes, jes, ĝi estas ja tie? - Nenio! - Verŝajne iu intence kaŝis ĝin, se vi vere lasis ĝin ĉi tie. –
- Marička: Tiel! - Kiu povus tiu esti? - Nur tiu, kiu estis hodiaŭ la unua en le klaso. - Aha, aŭskultu ambaŭ, kiu estis hodiaŭ la unua en la lernejo?
- Binče: Kial vi tion demandas? –
- Jurček: Mi estis.... Mi nun venis, kiel vi vidis.
- Nežika: Binče kaj mi estis la unuaj. - Neniu ankoraŭ estis ĉi tie. –
- Marička: Poste vi devus vidi la tranĉileton kaj vi ankaŭ prenis ĝin! -Ne estu stulta! -
- Nežika: Mi vidis nenian tranĉileton. - Sciu, ke mi ne prenis ĝin! - Kiel vi povas ion tian diri? –
- Marička: Se la tranĉileto estis ĉi tie, ne povas esti alie.
- Anica: Ĉi tie mi forgesis ĝin! –
- Marička: Kien malaperis ĝi? – Nevidebla ĝi ne povis fariĝi. Se vi estis la unuaj, vi devis la tranĉileton vidi, tio signifas, ke vi prenis ĝin aŭ vi kaŝis ĝin. - Mi ja ne estas stulta, ke mi ne komprenas tion. - Se vi ne prenis ĝin, poste faris tion Binče. –
- Binče: Kion mi faris? –
- Marička: Diru sincere, kien vi kaŝis la tranĉileton! –
- Binče: (kolere) Ĉu mi kaŝis ĝin? - Mi ne vidis ĝin! - Atentu, kion vi babilas, lastfoje vi diris, ke mi estas ŝtelisto. Ankoraŭ nur unu tian elbuŝigu vi, kaj...!
- Marička: Kial vi rezistas? - Mi ne diris, ke vi estas ŝtelisto. - Sed, se la tranĉileto estis ĉi tie, kaj vi venis la unua en la klason, vi devis vidi ĝin!....Vi tiel grumblas..., sciu, sendube estas vi! -
- Binče: Kion vi diris? – Vi babilemulino, vi riproĉas al mi, ke mi ŝtelis la tranĉileton! – Diru ankoraŭfoje, se vi kuraĝas! –
- Nežika: Neniu de ni vidis ĝin, ni venis ja kune. –
- Marička: Kiu scias? - Ĉu mi ne povas suspekti? - Kion vi povas al mi? - Ĉu vi volas min tratabi? - Vi! - Neniu alia povas esti. – Vi tute pravas. - Vi estis, sciu, vi!
- Binče: (Ĵetas sin al Marička.) Ne asertu tion, mi ne estis, sciu? - (Oni eltiriĝas.) - Mi ne estis, mi nek vidis la tranĉileton! –
- Marička: Lasu min, lasu min! Auuu! –
- Nežika: Binče, lasu ŝin! - Vi ja ne prenis ĝin! - Vero jen montriĝos! Ĉesu, ĉesu! - Lasu ŝin!
- Anica: (Plorante ridas,) –
- Jurček: Dise! - Kiu scias, kie ŝi perdis le tranĉileton? –
- Instruistino (rapide enpaŝas): Tiel! – Bela aĵo? - Vi interbatiĝas! –
- Ĉiuj: Saluton!
- Instruistino: Ĉu vi ne hontas, kaj vi knabinoj? - Kio okazis? –
- Nežika: Kamaradino instruistino, Anica hieraŭ perdis la tranĉileton, ĉi tie, sed nun....
- Marička: Kamaradino instruistino, Anica hieraŭ perdis ĉi tie la tranĉileton, sed hodiaŭ ĝi ne estas plu ĉi tie...
- Binče: Oni parolas.... Marička diris.
- Instruistino: Malrapide, mi petas, kio okazis? Sidiĝu! Marička, diru vi! –
- Marička: Kamaradino instruistino, Anica hieraŭ perdis la tranĉileton, sed hodiaŭ ĝi ne estis ĉi tie. - Certe iu prenis ĝin. – Ĉi tie, ĉi tie ŝi forgesis ĝin. - Kaj neniu alia povas esti ol...
- Instruistino: : Nur malrapide! - Atentu! - Kiel okazis? - Via tranĉileto, do malaperis, Anica? –
- Anica: Jes, la onklo donis ĝin al mi por la naskiĝtago! –
- Instruistino: Kaj ĉi tie vi forgesis ĝin, vi diris? –
- Anica: Jes, ĉi tie, sur la benko. –
- Instruistino: Ĉu vi tute certe scias tion? –
- Anica: Jes, mi bone rememoras. –

Instruistino: Ne estas en ordo, ke vi malatentas viajn aĵojn! - Nu, ke ni serĉu nun vian tranĉileton! -

Mariĉka: Kamaradino instruistino, se la tranĉileto estis vere ĉi tie, ĝin prenis neniu alia, kiel tiu, kiu estis la unua en la klaso.

Instruistino: Sed, kiu estis la unua? -

Nežika: Ni du, Binĉe kaj mi estis la unuaj, kamaradino instruistino, sed mi ne vidis la tranĉileton. -

Binĉe: Kamaradino instruistino, mi ankaŭ ne vidis ĝin, sed Mariĉka diris, ke mi ĝin ...

Mariĉka: Jes, mi diris veron. Ili venis la unuaj en la klason. Se estis la tranĉileto ĉi tie, neniu alia prenis ĝin, ol vi. Mi ja vidis, kiam vi ion kaŝis sub la benkon, kiam mi eniris. Kion vi kaŝis, ha?

Binĉe: Mi, kamaradino instruistino, mi tranĉileton eĉ ne vidis, vere! -

Mariĉka: Kion vi do kaŝis, ha? -

Nežika: Mi venis ja kune kun li kaj la tranĉileto estis nenie. -

Instruistino: Bone! - Ankoraŭfoje ni traserĉos ĉion! - Ĉiu staru sur sia loko! Kiu venis la lasta en la klason?

Mariĉka: Jurĉek estis la lasta. -

Jurĉek: (strange) Mi... Jes, mi...

Instruistino: Ha, tiel! - Ĉiuj donu la saketojn kaj aktuojn sur la benkojn! - Nun, Jurĉek, traserĉu ĉiujn saketojn, aktuojn kaj ĉiujn poŝojn!-- Mi esperas, ke la ŝtelisto ne estas ĉi tie. - Tio estus malbele, honte! ... Nu, kial vi staras, Jurĉek, traserĉu!

Mariĉka: Nu, traserĉu min, mi ne havas ĝin! Mi ankoraŭ neniam ŝtelis, - Le mano sekigu al mi, se mi iam prenis lon! - Nur unufoje mi prenis sukeron al la patrino, sed tiam mi estis bone batita. -

Binĉe: Ankaŭ mi ne havas ĝin, nur rigardu! -

Nežika: Ankaŭ mi ne, kvankam iu diris, ke mi ŝtelis, ne! (ekploras). -

Jurĉek: (ekhaltas). -

Instruistino: Nu, ŝi ne estas! - Kial vi atendas, Jurĉek? - Serĉu, traserĉu ankoraŭ! - Anica, ĉu vi bone scias, ke vi perdis la tranĉileton ĉi tie? -

Anica: Jes, tiel ŝajnas al mi! - Ne, mi estas tute certa! -

Instruistino: Tamen ni trovis nenion! - Mi estas feliĉa, ke inter vi ne estas figelernantoj. - Sciu, pioniroj, al mi estus malfacile, se lu el vi estus preninta la tranĉileton. -

Mariĉka: Mi ne prenis ĝin! -

Binĉe: Mi ankaŭ ne! -

Mariĉka: Do, vi ne havas ĝin? - Sed, kion vi kaŝis sub la benko, ha?

Nežika: Silentu tamen! -

Instruistino: (al Binĉe) Bone, vi ne prenis ĝin. - Anica, ne ploru! - Eble trovis ĝin iu bona, karaktera kaj honesta homo, kaj li certe redonos ĝin, vi denove trovos vian tranĉileton! - Sed vi devas esti pli atentema pri viaj aĵoj! - Kion nun diros al vi via onklo, ha? ... - Kiu estas deĵoranto hodiaŭ?

Nežika: Mi estas tiu ĉi semajne, kamaradino instruistino. -

Instruistino: Akvumu la florojn kaj malplenigu la balaajujon!

Nežika: Tuj! (Ŝi iras al la balaajujoj). -

Jurĉek: Atendu, atendu, mi malplenigos ĝin! -

Instruistino: Oho, vi volas esti kavaliro? -

Jurĉek: (Levas la korbon kaj volas rapide enpoŝigi la tranĉileton.) - (Tranĉileto elfalas). -

Ĉiuj: Jurĉek!.... Vi? ...

Instruistino: Ĉu vi, Jurĉek?...

Jurĉek: (Lasas fali la korbon kaj esploras).

Kurteno falas.

Obvestila in vabila

Informoj kaj invitoj

Baltiaj Esperanto-Tagoj 2022



La 56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj denove reale kaj fizike okazos en Litovio la 9-17-an de Julio 2022, ĉi-foje en Litova havenurbo Klaipėda apud Balta maro, en la universitato de Klaipėda. Litova Esperanto-Asocio invitas

Vin ĉiujn partopreni kaj partoprenigi aliajn. La aranĝo estas dediĉata al la 770-jariĝo de Klaipėda kaj al la 135-jariĝo de Esperanto.

BET-56 havas auspicion de la Universala Esperanto-Asocio. Alta Protektanto de BET-56 estas la urbestro de Klaipėda Vytautas GRUBLIAUSKAS. Detalaj informoj pri la aranĝo estas en Informa bulteno pri BET-56 ĉi tie: <https://sezonoj.ru/2021/08/bet-99/>. Reta aliĝilo al BET-56 estas trovebla ĉi tie: <https://mallonge.net/gl>.

Partoprenantoj de BET-56 havos luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo. BET-56 estos vere altnivela internacia esperantista aranĝo kaj programe kaj organize. La programo kiel kutime dum BET-oj estos tre varia kaj interesa. Organizantoj de BET-56 tre akurate zorgos pri ĉiuj sanprotektaj aferoj por eviti pandemiajn danĝerojn.

Konstante aktualigataj ĉiuspecaj informoj pri BET-56 estas en:
<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56>.

Aparta rubriko pri BET-56 estas ankaŭ en la novaĵ-retejo *La Ondo de Esperanto*: <https://sezonoj.ru/bet/>.

Ĉiujn aktualajn informojn pri BET-56 liveras ankaŭ la Eventa Servo: <https://eventaservo.org/e/BET-56>.

Bonvolu plani Vian partoprenon en tiu ĉi grava internacia esperantista aranĝo.

Zamenhofa Tago ĉe FEI

La 14-an de decembro 2021 je la 21-a horo laŭ la lokala tempo, la itala landa esperantista asocio FEI preparis retan Zamenhofan Tagon. Partoprenis ĉirkaŭ 65 personoj de Brazilo kaj Usono ĝis Hungarujo kaj Kroatujo. El Slovenujo mi notis 6 geesperantistojn. La plej interesaj parolantoj estis Michela Lipari kaj Carlo Minnaja el Italujo, Roman Dobrzynski el Pollando, la pranepino de la majstro Margaret Zaleski-Zamenhof, kaj fine Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, bienuloj de »Bona espero« en Brazilo. Gratulojn al FEI pro la interesa aranĝo! Mi deziras, ke virtuala aŭ hibrida partoprenado estos daŭre gardata ankaŭ post la pandemio. **O.K.**

Reta kunveno de TEA

La retan novjaran kunvenon de Triesta Esperanto-Asocio la 8-an de januaro 2022 je la 18-a partoprenis 16 gesperantistoj, membroj kaj amikoj de la asocio (9 el Italujo, 4 el Kroatujo, Nika, Zdenka kaj Ostoj el Slovenujo kaj po 1 el Hungarujo kaj Litovujo). La prezidantino de TEA, Edvige Ackermann, preparis buntan programon. Mi kontribuis la prezenton de la du novaj libroj de ES Ljubljana, Roberto Maglica montris belegajn fotojn de la vizito al Bialistoko, Andrea Gallo ĉarme per fotoj invitis nin al Pordenone, Edvige prezentis tre interesajn malnovajn fotojn de Triesto ktp. Tre agrabla vespero kaj bonvena okazo de almenaŭ virtuale renkonti geamikojn! **O.K.**

Malfermo de la nova retejo de KEL

Kroata Esperanto-Ligo prezentis la 12-an de januaro 2022 sian novan retejon kadre de la projekto Esperanto – la diĝita prilaboro de la nemateria kultura heredaĵo, kiun finance subtenis la Ministerio pri kulturo kaj medioj de Respubliko Kroatujo.

Kvar slovenaj geesperantistoj virtuale ĉeestis la videokonferencon okaze de la malfermo de nova paĝaro de KEL. Entute aliĝis al la hibrida evento 21 komputiloj aŭ telefonoj, kelkaj el ili estis en la oficejo de KEL kun pliaj ĉeestantoj.

La malnovaj retpaĝoj, kiujn gvidis forpasinta Davor Klobučar, kaj ĉiuj materialoj sur ili estos daŭre disponeblaj ĉe la butono *Arkivo*. La novaj retpaĝoj estas desegnitaj kiel loko kie ĉiuj interesuloj povas ekscii bazajn informojn pri Esperanto en Kroatujo kaj vidi la lastajn novaĵojn. Novajn retpaĝojn prizorgas la teamo de Studenta Esperanto-Klubo: Mihaela, Đivo, Robi kaj Roberto. Estonte oni prezentos kelkajn ĉapitrojn el la riĉa historio de Esperanto en Kroatujo en nova kaj interesa maniero.

Vizitu la paĝaron per <https://esperanto.hr/wp/>.
O.K.

Seme na plodnih tleh

V letih 2018 in 2019 je Nika Rožej izvedla več predstavitev esperanta za razne starostne skupine otrok na OŠ Trnovo v Ljubljani (glej naš bilten št. 2018/4, str. 5 in 2019/4, str. 3). V ĉasu epidemie Kovid-19 seveda taki obiski na ŝolah niso primerni. Zato je tamkajŝnja učiteljica Nevenka Dolenc samoiniciativno organizirala predstavitev esperanta s pomoĉjo naŝih datotek, ki smo jih v ta namen pustiliv njenem raĉunalniku. Napisala je:

»Ker je bil evropski dan jekov, 26. september 2021, ĉez vikend, sem predavala s vojemu petemu razredu o esperantu v ponedeljek, 27. septembra. Pogovarjali smo se, kdo ga je ustvaril, kaj je bil namen. Ogladali smo si kratek video in power-point-predstavitev. Otrokom je bila ideja o jeziku zelo zanimiva, dobronamerna. Nekaj esperantskih besed smo se tudi nauĉili.«

Veselo smo bili preseneĉeni, da so nastopi na tej osnovni ŝoli pustili trajno sled in da je bilo moĝno tudi v sedanjih razmerah brez naŝe prisotnosti izvesti pouk o esperantu. Bravo Nika, bravo gospa Dolenc! **O.K.**

Uradni turistiĉni vodnik za esperanto

Naŝ kolega iz Kranja Gregor Mrkiĉ, sicer ĉlan ED Ljubljana, ima poleg ostalih registritano tudio dejavnost turistiĉnega vodnika. V registru turistiĉnih vodnikov z opravlenim drĉzavnim izpitom <http://vodniki.registri.si/> smo poiskali vodnike za esperanto in dobil en sam zadetek – Gregor Markiĉ. Gregor je povedal, da je moral kar nekaj ĉasa vztrajati, da so v njegov registriki zapis vnesli tudio jezik esperanto. No, zdaj pa je v naboru jezikov tega registra tudio mednarodni jezik. Upamo, da ga bo ŝe kdo posnema, zlasti v Ljubljani, Mariboru in Kopru. V ta namen je treba pripraviti ŝe nekaj turistiĉnega gradiva v esperantu in izvesti teĉaj esperanta za turistiĉne vodnike in vodnice. **O.K.**

Poŝtkartoj al niaj EU-parlamentanoj

Laŭ la iniciativo de UEA/EEU-kampanjo »Antaŭenigi Esperanton en Eŭropa Unio«, SIEL la 18-an de februaro sendis ok tiucelajn poŝtkartojn al la EU-parlamentanoj el Slovenujo. La teksto en la slovena atentigas la adresatojn pri la plej ŝatata propono enkadre de la Konferenco pri la estonto de Eŭropo kaj avertas ilin pri nia deziro persone prezenti ankaŭ aliajn poresperantajn proponojn.



La ok specialaj poŝtkartoj por la slovenaj EU-parlamentanoj

La poŝtkartoj estas afrankitaj per jubileaj poŝtmarkoj de ES Ljubljana, tipo C. Ni deziras, ke ankaŭ la kuriozaj poŝtmarkoj estu perceptitaj de la ricevontoj. Bonan alvenon kaj fruktodonan akcepton, karaj malnovmodaj mesaĝiloj! **O.K.**

Esperantistoj en Kroata Parlamento akceptitaj en Fako pri la eŭropaj aferoj

S-ro Domagoj Hajdukoviĉ, prezidanto de Oficejo por eŭropaj aferoj ĉe la Kroata parlamento, akceptis la 3-an de februaro 2022 delegacion de Kroata Esperanto-Ligo por informiĝi pri la kroata kontribuo al Konferenco pri la estonteco de EU. La delegacio konsistis el Spomenka Ŝtimec, prezidantino de Kroata Esperanto-Ligo, Maja Tiŝljar, konsilantino de la Eŭropa Esperanto-Unio kaj gvidantino de la projekto "Akcelilo por multlingveco", kaj Đivo Pulitika, prezidanto de Kroata Esperanto-Junulara Asocio. Kiel membro de la delegacio partoprenis ankaŭ Szabolcs István, prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio.

S-ro Hajdukoviĉ kun granda intereso aŭskultis pri la propono de la irlanda diplomato Seán Ó Riain al la Konferenco pri la estonteco de EU. La propono traktas la bezonon pligrandigi la instruadon de fremdaj lingvoj en EU. Li tre interesiĝis pri la ilaro al kiu atentigas d-ro Ó Riain, la ilaro kiu povus gvidi al pligrandigo de multlingveco en EU "Akcelilo por multlingveco".

Spomenka Ŝtimec klarigis ke temas pri la kroata projekto kiun ekde 1979 ĝis sia morto en 2020 gvidis kroata esperantisto Zlatko Tiŝljar el Velika Gorica. Kadre de tiu projekto estis publikigitaj multaj lernolibroj de Esperanto en 34 lingvoj dise tra la mondo. Baze de la "Akcelilo" estas la propedeutiko: lernantoj en la unuaj lecionoj lernas la bazon de la parolata Esperanto por ricevi ideojn kiel lingvoj funkcias. S-ro Hajdukoviĉ proponis sian helpon pri informado pri la propono kaj la projekto en kroata parlamento. Li donis plurajn utilajn konsilojn kiel Kroata Esperanto-Ligo informu ĵurnalistojn kaj lernejdirektorojn pri la projekto. Se esperantistoj akceptas, li mem trovos manieron paroli antaŭ la parlamentanoj pri la temo.

S-ro Szabolcs gratulis al s-ro Hajdukoviĉ ĉar Kroatujo protektis la tradicion de Esperanto kiel nematerian kulture heredaĵon de Kroatujo. "Tio estas vera leciono ankaŭ por ni, hungaroj. Ĉe ni ĉirkaŭ 60-70% de la loĝantoj ne parolas fremdan lingvon kaj Esperanto povus grave mildigi la situacion, kontribuante al komunikado. Mi miras ke Kroatujo ne pli profitas de tio kion ĝi protektis. Ekzemple, ĉu ne Zagrebo devus esti la monda ĉefurbo de Esperanto? Tio fariĝas des pli interesa, kiam Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo planas vendi la domon, kie ĝi havas sian sidejon ..." S-ro Hajdukoviĉ petis pli da materialoj pri la temo.

Spomenka Ŝtimec

(Fonto: EKO 2022, n-ro 11, febr. 18)

Invito al IJF en Dolomitoj

La Internacia Junulara Festivalo IJF denove okazos en fizika ĉeesto ĉijare. Kiel kutime, ĝin organizas Itala Esperantista Junularo IEJ, kaj – kiel kutime – ĝi okazos dum la paska semajno, do ĉijare de la 13a ĝis la 19a de aprilo 2022.

La Festivalejo kiun ili trovis estas spektakla gastejo por junuloj kaj sportistoj, meze de la montoj Dolomitoj, ĉe la landlimo inter Italujo kaj Aŭstrujo; la nomo de la loko estas Piani di Luzza, ĝi troviĝas je 4 km de la fama ski-centro Sappada, kaj retpaĝo de nia gastejo 'Bella Italia' estas <http://www.bellaitaliadolomiti.com/>. Ĝi estas facile atingebla el la aŭtoŝoseaj landlimoj Tarvizo, Brenero kaj Triesto ankaŭ per publikaj transportiloj, kaj la plej proksimaj flughavenoj estas Venecio VCE, Triesto TRS, Trevizo TSF, el kiuj ni ankaŭ planas organizi aldone propran servon de aŭtobusoj.

La baza loĝado estos en 4-6 litaj ĉambroj, ĉiuj ekipitaj kun propra banejo, televido, ĉiuj servitaj de WiFi. Estos ankaŭ disponeblaj du- kaj unu-litaj ĉambroj. Dum la aranĝo ĉiuj sportaj ekipaĵoj estos je nia libera dispono, inkluzive de la naĝejo 25-metra kaj de la saŭno.

La programo inkluzivos prelegojn, seminariojn, lingvajn kursojn, koncertojn kaj aliaj artajn aranĝojn. Estas planata aparta seminario pri la lingvaj komunumoj de la teritorio, kiu tradicie parolas varianton de la furlana lingvo, sed – ekzemple en Sappada – kun germanlingvaj vilaĝoj. Jam planita estas la starigo de rapida lingvokurso, kiu estos 30 -hora kaj kiu je sia fino (en lundo) permesos partopreni la ekzamenon (KER-nivelo A2) de la Itala Instituto de Esperanto.

Kiel indikite en la retejo iej.esperanto.it/ijf/2022, la publikigitaj prezoj inkluzivas la programon, la loĝadon, la manĝojn, la koncertojn kaj la uzon de la naĝejo. Por grupa partopreno eblas ricevi apartajn rabatojn. **Bruĉjo Kasini**, esperanto@edistudio.it

Kiel atingi ĝisdatajn informojn?

Ĉe ŝelite biti dobro obveŝĉeni o dogajanju v »Esperantuĵi«, ne smete ĉakati na obvestila in okroĉnice ter morebitno elektronsko poŝto. Internet seveda omogoĉa ogromno informacij, morda ŝe preveĉ, in jih je teĉko selekcionirati.

UEA in ILEI sta odliĉna vira, ki skrbita za zanesljivost in aktualnost svojih spletnih strani. Ni slabo vsaj enkrat na teden vstopiti na prvo stran teh dveh spletiŝĉ in pregledati, kaj je novega. Lahko se tudi naroĉite za obveŝĉanje po elektronski poŝti, da vas opozori na novosti.

Izbral sem tri mesta, ki jih priporoĉam spremljati, ĉeprav je ŝtevilo in izbor virov stvar vsakega posameznika:

- <https://edukado.net/kursejo>
- <https://eventaservo.org/>
- [Komunikoj pri Agado | Retejo por Aktivuloj](#)

Spletiŝĉe aktivulo.net izdaja bilten Esperiga Komunikoj (EKO) 2022, ki vsebuje informacije o preteklih in bodoĉih dogodkih, tudi takih, ki so ŝe v rozvojni fazi. Zanimiv je na primer naĉrt seminarjev programa »Aktivula Maturigo« (AMO) za letoŝnje leto v prvi letoŝnji ŝtevilki. Spletne in hibridne izvedbe seminarjev AMO so zanimive za vsakega od nas! **O.K.**

Esperanto en la antaŭlernejo

Dragica Ropret Ŝumer, ki je naŝ ambasador v vrtĉih, je tako opisala svoj doprinos vrtcu Viŝki gaj v letu 2021:

12. 1. 2021: Izvedba esperantske delavnice »Spoznajmo esperanto – deli telesa« za otroke dveh skupin, 4-5 in 5-6 letnih otrok.

13. 1. 2021: Izvedba esperantske delavnice »Spoznajmo esperanto – barve in ŝtevilka« za otroke dveh skupin, 4-5 in 5-6 letnih otrok.

27. 9. 2021: Ob Evropskem dnevnu jezikov izvedba esperantske delavnice »Z esperantom v pravljiaĉni svet« v skupini 5-6 letnih otrok.

5. 11. 2021: Izvedba kamiŝibaj predstav v esperantu v skupini 5-6 letnih otrok.

Otroci, ki so bili navzoĉi na esperantskih delavnicah, so prejeli tudi zgibanke s slovarĉkom vseh besed, ki smo jih v delavnicah spoznavali. V moji skupini je slovarĉek visel tudi v igralnici na vidnem mestu in otroci so celo leto samoiniciativno besede tudi obnavljali.

Drugje pa nisem mogla izvesti niĉesar. **D.R.Ŝ.**

Preleĝo okaze de ITGL



Ob Mednarodnem dnevnu maternega jezika je 21. 2. 2022 ob 18. uri Mario Vetrih iz ED Maribor gostil video-konferenco na platformi Meet. Zbralo se naŝ je 20 iz vse Slovenije ter Vinko iz Celovca in Vlado iz Moskve. Po uvodnem v naprej pripravljene predavanju Maria, spremljanem z besedili v slovenŝĉini in esperantu ter slikami, se je rozvila ŝvahna rozprava o naĉelih za praviĉno rozreŝitev problema zagotavljanje pouka otrok v maternem jeziku. Virtualno sreĉanje je trajalo dobro uro. **O.K.**

La jarkunveno de SIEL 2022

Izvršni odbor Združenja za esperanto Slovenije (ZES) je na sestanku 23. februarja določil datum in vsebino redne letne skupščine ZES. Ta bo sklicana zaradi pandemijskih razmer kot spletna video-konferenca na platformi Zoom in sicer za

petek, 18. marca 2022 ob 18. uri.

Poleg običajnih točk dnevnega reda so predvidene volitve organov ZES za naslednji dve leti ter informacija in razprava o vključevanju slovenskih esperantistov v Konferenco o prihodnosti Evrope.

Na skupščino ZES bodo povabljeni vsi slovenski esperantisti, člani naših esperantskih organizacij in prijatelji esperanta, glasovalno pravico pa bodo imeli v skladu s statutom ZES vsi individualni člani in zastopniki naših kolektivnih članov EDL, EDM, ESKDSG in ŽEDM.

Pisna gradiva lahko pričakujete v okrožnicah ZES ali kot klasično pošto najkasneje en teden pred sklicano Skupščino. Morebitna vprašanja ali pobude lahko že pred skupščino naslovite na info@esperanto.si, da bomo pripravili kakovostne odgovore. **IO ZES**

Jarkotizoj de SIEL kaj ESL

Letna članarina **ZES** za individualne člane je 12 € za zaposlene, 6 € za študente, upokojece in brezposelne ter 0 € za mlade do 18. leta. Članarino ali prostovoljne prispevke lahko plačate na srečanjih in sestankih ali na poslovni račun ZES pri Delavski hranilnici d. d. Ljubljana št. SI56-6100-0001-2538-761 z obrazcem UPN. Kot kodo namena vpišete »char« in namen plačila: »priimek, članarina in ustrezno leto oz. obdobje«. Pri referenci prejemnika vpišete kodo SI99, ostalo pa pustite prazno.

Letna članarina **ED Ljubljana** ostaja na ravni iz prejšnjega leta, to je 12 € za zaposlene, 6 € pa za brezposelne, upokojece in študente. Članarino ali prostovoljne prispevke lahko plačate na srečanjih in sestankih ali na poslovni račun EDL pri Delavski hranilnici d. d. Ljubljana št. SI56-6100-0000-1703-764. Glejte še navodilo za izpolnitev obrazca v zgornjem odstavku. **O.K.**

Kion oni legos en la sekvonta numero?

Por la sekvonta numero de *Informacije / Informoj*, kiu aperos meze de majo 2022, ni antaŭvidas la raportojn pri la printempaj aranĝoj en Esperantujo (ĉefe la jarkunvenoj) kaj kelkajn gravajn anoncojn. Krome ni atendas artikoletojn pri:

- fizikaj kaj virtualaj esperantaj kursoj en Slovenujo
- kion planas niaj organizaĵoj por la jaro 2022
- katalogo de la faka biblioteko de SIEL
- turisma agado esperante
- »novaĵoj« el la arkivo de ES Ljubljana
- ĉu ni bezonas sloven-esperantan bibliografion?
- el la historio de nia movado ktp.

La redaktoro rekomendas sin por kontribuoj pri viaj agado, proponoj, komentarioj, fotoj kaj rimarkoj, kiuj povus interesi la legantaron. Aparte estas bonvenaj verkoj en Esperanto, ĉar ni ĉiuj bezonas ekzerciĝon kiel aŭtoroj kaj legantoj. **O.K.**

Pa ŝe to....

Kaj ankaŭ tion ĉi...

Oglas - Anonco

Esperantsko društvo Ljubljana ponuĵa **dvojček knjig iz leta 2021** po izredno ugodni ceni. Knjigi, ki oznaĉujeta 100-letni jubilej društva, ne bi smeli manjakati v domaći knjiĵnici nobenega slovenskega esperantista:

Alma – La mondo antaŭ la hejma sojlo 12,- €

La kroniko de Visoko 18,- €

Izredna cena za dvojček je (prezo por **la duopo**) 19,50 € + morebitna poŝtnina in pakiranje (+ sendkostoj).

Najhitreje in najceneje dobone knjigi v klubski pisarni na Grabloviĉevi 28. Tam je ŝe marsikaj zanimivega!

Naroĉila (mendoj) lahko poŝlĵete tudi po elektronski poŝti na naslov: info.ljubljana@esperanto.si.

INFORMACIJE / INFORMOJ izdaja / eldonas Združenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Grabloviĉeva 28, SI-1000 Ljubljana, Slovenija / Slovenujo. <http://www.esperanto.si>. Matična št. / kodnumero 1205226. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777. Poslovni račun / bankkonto: IBAN SI56 6100 0001 2538 761 pri / ĉe Delavska hranilnica d. d.. (Swift-kodo: HDELSI22). Uredil / redaktis Ostoĵ Kristan, lektoriral / kontrollegis Tomaĵ Longyka.

ISSN 2385-992X Naklada / eldonkvanto: 60

ISSN 2385-9628 URL: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>